7-a JARO, N-o 364

LEIPZIG, 24. / 9. 1931

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE

REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lehner, Kolmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio).

APERAS SEMAJNE

Pri la kvinjara plano

AL LA SOCIALISMO AŬ AL LA FARAONISMO?

La estinto

Ni ĵetu rapidan ekrigardon malantaŭen.


Oktobro 1917. La nokton mem de la Revolucio, Lenin redaktas dekreton, voĉdonatan je la morgaŭo de la Sovetkongreso, kiu disdonas la bienojn inter la kamparanoj.

Tio estas en la plej alta grado kontraŭsocialisma.

La socialisma solvo ne estas dividi la grandajn feŭdajn bienojn en malgrandajn parcelojn. Ĝi estas daŭrigi la grandskalan kulturadon, aligante ĝin en komunan posedaĵon. Tion provos, cetere, post unu jaro, la hungaraj sovetoj. Sed Lenin opinias, ke la subteno, tuta k *tuja* subteno de la kamparanoj estas nepre necesa al la Revolucio, k ke oni povas havi tiun subtenon nur per „disdonado" de la bienoj. Sekve Lenin redaktas la dekreton, kiu entenas la tutan programon de tiuj, kiujn li kontraŭbatalis dum sia tuta vivo, k precize, pro tiu ĉi programo, la socialist-revoluciulojn.

Por la industrio oni montras sin malpli rapidema. Ŝajnas, ke oni volas sociigi nur iom post iom. Sed la okazaĵoj trudas. La mastroj fermas la fabrikojn, aŭ intence fuŝas, aŭ ribelas. Tamen necesas, ke la fabrikoj funkciu: sekve la laboristoj okupas ilin. Fakta sociigado efektiviĝas tiel, kiu vastiĝas pli k pli k, fine, elfunda ondego, naskiĝinta el la pleja profundo de l'revolucia instinkto, forbalaas ĉion: unu jaron post Oktobro, la tuta industrio estas sociigita.

Estas la periodo de tio, kion oni nomos ... pli poste, „la milita komunismo", sed kion oni, prave, tiutempe nomas simple la komunismo. Ĉiu devas labori. Ĉiu devas alporti sian parton al la komuna laboro. „Kiu ne laboras, tiu ne manĝas." Kompense, ĉiu rajtas ricevi unu parton, la saman, el la produktoj de la komuna laboro. La nuraj malegalaĵoj en la dispartigo devenas de tio, ke tiu, kies laboro estas pli peniga, rajtas havi pli grandan parton.



El la ferfabriko „Ruĝa Najlisto" en Sovetio.

Sed la kamparano, kiu nun havas sian grundon, sian propran ekspluataĵon, opinias, ke li havas personan rajton posedi la produktojn, kiuj devenas de lia ekskluziva laboro, de tiu de lia familio k de lia brutaro. Li ne povas kompreni, ke li devas alporti la frukton de sia laboro al la komuna amaso k kontentiĝi pri la parto, kiun oni deklaros, aŭtoritate, esti lia. Tiom pli, ke tiu parto estas, nuntempe, tre malgranda. Tiam oni estas devigita perforte forpreni liajn produktojn. Estas la reĝimo de la rekvizicio[1]. La kamparano, kiu unuamove aliĝis al la potenco, kiu donis al li la grundon k — krome, la pacon — ribelas kontraŭ tiuj, kiuj venas por forpreni la fruktojn de *lia* grundo. Li krias „Vivu la sovetoj", sed ankaŭ „For la komunon!". Li fine transiras al la armita batalo. Tio estas Kronŝtat.

Decida momento.

Per la sperto de Kronŝtat Lenin vidas sunklare, ke la reĝimo de l'komunista dispartigo ne povas daŭre esti aplikata en kampo, kie estis konservita la individua produktado. Absoluta malakordo. Tiom longe, kiam la terkultura produktado restos individua, ne estos ebla la komunista dispartigo en la kampkultura tereno. Estos do necese, starigi en la terkulturo la komercan sistemon, la ŝanĝosistemon per vendo k aĉeto, laŭ libere — aŭ preskaŭ libere — fiksitaj prezoj inter la vendanto k aĉetanto. Sed, se la komunismo ne aplikiĝas al ĉiuj produktoj, ĝi falas pro tio mem. Se oni restarigas en ajna punkto de la ekonomio la ŝanĝosistemon, oni estas devigata en ĉiuj fakoj restarigi ĝin. La komerco, k kun ĝi la privata posedo estas do restarigataj en U.S.S.R., kun, tamen, tiu apartaĵo, kiu estas nek komunismo, nek socialismo, sed „ŝtata kapitalismo", laŭ la esprimo de Lenin mem; nome, ke la granda industrio restas ŝtata propraĵo; la ŝtato, same kiel aliaj entreprenoj, vendos tion, kion la industrio produktos, k aĉetos tion, kion ĝi bezonos. Tio estas la N.E.P. (Nova Ekonomia Politiko).

N.E.P., batalejo.

La N.E.P. tuj formos grandegan batalejon.

Batalo, kiu daŭros dum ok jaroj.

Kiu venkos? La privata kapitalismo aŭ la ŝtatkapitalismo?

[1] Laŭleĝa forpreno. — *Red.*

La privata propraĵo superas per tio, ke ĝi estas la reĝimo de pli ol 100 milionoj da kamparanoj; ĝi estas do nombre la reĝimo de la granda plimulto. Ĝiaj rilatoj regadas la tutan ekonomion, ĉar la ŝtata industrio mem vendas, aĉetas, dungas, maldungas, pagas salajrojn, kiel iu ajn privata entreprenisto. La ŝtato estas nur posedanto inter aliaj posedantoj, submetita al la komunaj leĝoj kiel ĉiuj posedantoj.

Tamen la ŝtata industrio superas per sia maso.

Ĝi diferencas de la ŝtataj industrioj, kiuj ekzistas, tie k ĉi tie, en la kapitalistaj landoj per tio, ke ĝi, fakte, ampleksas la tutan industrion. La soveta ŝtato ne estas industriisto inter dekmiloj da aliaj industriistoj, el kiuj granda nombro estas pli grava ol li. Ĝi estas la sola granda industriisto. Ĝi posedas, aparte menciinde, ĉiujn fundamentajn industriojn, „la ŝlosil-industriojn," kiel oni diras, tiujn, kiuj teknike komandas la aliajn, ĉar ili produktas la krudaĵojn k aliigas ilin unuavice: la minejoj, la metalurgiaj fabrikoj, la ŝpinejoj, ktp... Tiu ĉi diferenco pri „kvanto" sekvigas diferencon pri „kvalito".

Krome, k precize por protekti sian industrion, la ŝtato starigis tutan sistemon de reguligo k de kontrolado super la privataj interŝanĝoj (speciale la monopolon super la eksterlanda komerco), same kiel tutan sistemon de impostoj, kiu premesas al ĝi, ĉiutempe, enmiksiĝi en la prezoj. La N.E.P. restarigis la liberon de l'interŝanĝoj; sed ĝi volas, ke tiu libero estu libero kontrolata.

Tiuj du principoj estas neakordeblaj. Nepras, ke unu frakasu la alian. La privata ekonomio devas frakasi la ĉenojn, per kiuj oni ĝin katenis; ĝi devas povi larĝe etendiĝi al ĉiuj fakoj, inkluzive al la fundamentaj industrioj, aŭ ja la ŝtata industrio devas invadi la citadelon de la privata ekonomio: la terkulturan produktadon.

La batalo inter tiuj du produktmanieroj estos tuj superregata de gravega problemo: kiel pligrandigi la produktadon? Depost 1917, la ĉefa karakterizaĵo de la soveta ekonomio estis la malabundo: manko de nutraĵoj, manko de krudmaterialoj, manko de komercaĵoj.

Kiel ĉesigi tiun ĉi malabundon?

Per pligrandigado de l'privata produktado, — tia estas la unua respondo. Estas la granda epoko de l'flatado al la *kulakoj*, pro tiu cirkonstanco alinomitaj „mezaj kamparanoj", k de industriaj koncesioj al la fremda kapitalo. „Riĉigu vin!" krias Buĥarin al la kamparanoj, dum Trocki vidas la savon nur en industriigo de la lando per la helpo de l'kapitaloj de Harimen (Harriman) k samspeculoj.

Sed la kapitalo malvolonte porhelpe moviĝas, tiel la interna, kiel la eksterlanda; tiel same la *kulako*, posedanto de du ĉevaloj, kiel la germana aŭ usona miliardulo.

Unu kiel la alia ne deziras alion ol „produktadi"; ili estas tute pretaj gajni profiton sur la dorso de la rusa proleto, sed je unu kondiĉo: ke la posedo de tiu profito estu al ili garantiata. Ili bezonas certigon, ke tiu rajto al profito, kiun oni teorie konsentas al ili, ne estu, pecon post peco, praktike forprenata. Sen tio, la kulako produktos nur ĝuste la kvanton da tritiko, necesan por lia nutrado, k la fremda kapitalisto malakceptos la koncesiojn aŭ, se li akceptas ilin, li rapide senefikigos ilian uzon.

La maleblo de l'duobla sistemo evidentiĝas do pli k pli. Aŭ oni devas ĉion malteni, aŭ oni devas ĉion detrui. Se oni volas eliri el la malabundo, se oni volas vere produkti, necesas: aŭ restarigi tute liberan kapitalismon, aŭ denove detrui la kapitalismon. Tiu N.E.P., kiun Lenin montris kiel maldaŭran pozicion de cedo, elmontriĝas pli k pli netolerebla.

Komence ŝajnas, ke oni ekmaltenos ĉion. De 1921 ĝis 1927, la koncesioj al la kapitalismo, k speciale al la kamparana kapitalismo, krom de tempo al tempo kelkaj subitegaj iroj returnen, fakte pligrandiĝis senĉese. La kapitalismo ŝajnas venkanto.

Tiam, dek jarojn post Oktobro, ĉiuj, kiuj estas ankoraŭ revoluciuloj inter la batalintoj de la granda epoko, sin ĵetas sub la radojn de la ĉaro.

Fariĝas tio, kion en politikista lingvo oni nomis „la bloko de la opozicioj". Ĉiuj, kiuj estis tenintaj la unuajn lokojn ĉe la batalo, en la epoko de l'civila milito, nekonataj aktivuloj, sekretarioj de l'partio, prezidintoj de la Leningradaj k Moskvaj Sovetoj, prezidinto de l'popolkomisararo de Ukrainio, komisaro de la Ruĝa armeo ... frontunuiĝas kontraŭ Termidoro.[2]

Ili estis forpuŝataj.

Sed la ĉaro de la kapitalismo ne trapasis. La ĝis Glacia Oceano ekzilitoj estis apenaŭ atingintaj sian „restadejon", kiam okazis tuta transformado en la politiko de la potenco. La opozicio estis frakasita, sed ĝi triumfis.

Kio do okazis?

Okazis ĉi tio, ke oni vane sendis al la ekstrema nordo aŭ al la ekstrema sudo, sub la polusan cirklon aŭ en la centran Azion la aktivulojn de la opozicio, ke la G.P.U. vane ĉiutage arestis pro „kontraŭrevolucia aktiveco" centojn da laboristoj suspektaj pri simpatio al la opozicio; ties aktiveco k speciale, laŭŝajne, la aktiveco de la grupo Sapronov-Smirnov nur kreskadis k renkontis simpation pli k pli grandan ĉe la laboristoj. La sovetia proletaro ne volis esti priŝtelita je la Oktobraj konkeroj.

Tiam komprenante, ke la subpremaj decidoj estus senpovaj por haltigi tiun fluon, ke nur per profundaj agrimedoj oni povus rompi ĝin, ke estus necese preni la gvidadon de la movado, se oni ne volus esti forportata de ĝi, Stalin efektivigis sian subitan ŝanĝon.

Post ekzilado al la „maldekstra flanko", li rompis kun la „dekstra" k ekaplikis la programon de la „maldekstra". *R. Luzon.* (Daŭrigota.)

Tradukis la Alĝera Esperantista Grupo el la franca revuo „La Révolution Prolétarienne" (La Proleta Revolucio).

[2] La 11-a monato de l'respublikana jaro (en Francio); monato, en kiu estis likvidata la Revolucio per la venko de l'moderaj elementoj (dekstruloj) super Robespjer (Robespierre) k liaj anoj (1794). — *Red.*

Kial vi, K-do,
ne verkas koncizajn raportojn pri okazoj en via regiono? Ni atendas vian kunlaboradon!

EL HISPANIO.

Kvankam la ĉi-suba parolado de s-ro Macia havas precipe lokan signifon, ni tamen publikigas ĝin, tial ke ĝia ĝenerala tono estas tre karakteriza k eĉ iel instrua por pripensemaj homoj.

Parolado de la prezidanto de la Kataluna Ĝeneralaĵo el Hispanio okaze de vizito en laborista vilaĝo Sardanjola.

Mi turnas min al la kataluna popolo. Sed en tiu ĉi momento pli taŭgas min limigi al la ektuŝita temo de la urbestro de Sardanjola k la prezidanto de la ĉi tiea kooperativo. Mi devas rilati al tio, kion mi diris al la ĵurnalistoj, ke malgraŭ la kontraŭstaroj k la malamikaj frazoj, kiujn ili povus paroli, ni iros laŭ nia vojo. Mi citas la urbestron k la prezidanton de la kooperativo, por ke ili libere donu al mi la informojn pri tiu ĉi ŝoseo, pri kiu mi devas diri, ke ĝi estos konstruata. Ni iras agante! Mi volas diri al vi, ke sur la laborvojo, malgraŭ granda krizo, kiun trapasas la privata banko k la nacia banko, ni intencas trovi ankoraŭ 300 milionojn da pesetoj por doni panon al la laboristoj, kiuj estas senlaboraj. Kaj mi povas diri al vi, ke tiu ĉi ŝoseo estos konstruata, ne nur ĉar vi bezonas ĝin, sed ĝin bezonas tiuj, kiuj hodiaŭ ne havas panon por alporti al la manĝotablo. Ni faros pozitivan agadon sen tro da paroloj, k mi diras al ĉiuj, ke tiom longe kiel la „Kataluna Ĝeneralaĵo" estos en nia mano, la laboristoj havos la plej bonajn garantiaĵojn je laboro k kulturo, por starigi sen ia dubo Katalunion al la fronto inter la plej kulturitaj popoloj en la mondo.

Ni homoj sur la maldekstra flanko, ni ne faros diferencojn en la agado, sed ni zorgos, ke ĉiuj havu la saman kulturon, sen diferenco inter tiu aŭ alia privilegiita klaso. Ni volas, ke malaperu tiu ĉi fantomo, pro kiu la laboristaj patrinoj ne scias, kiel iliaj filoj vivos en la morgaŭa tago. Ni, amikoj, kiuj ni aprobis la „Katalunan Regularon“, ni havos en niaj manoj la laboristan leĝ-sciencon. Kaj mi havas la certon, ke tiam la laboristoj staros apud nia dekstra flanko, ĉar ni zorgos, ke Katalunio kunpariĝu kun tiu lando, kie la laborista sento estas plej alta, la forto k la nervo de la mondo.

Estas dece, ke la laboristoj vidu tion, ĉar ni volas, ke la laboristoj sentu sin subtenantoj k helpantoj ĉe ĉiuj justaj depostuloj. Ĉar, amikoj, ĉiuj laboristaj depostuloj estas justaj. Ni kredas, ke en nenia partio de la laboristaro povas regi malbonvolo rilate al tiu ĉi regformo, kiun ni volas doni al Katalunio, ĉar ĝi estas la regformo, kiun ni volas doni al la laboristaro, la brako k centra kolono de la nova Katalunio. Mi ne scias elparoli mensogojn, ĉar la mensogoj bruligas miajn lipojn; k mi diras, ke mi amas super ĉio la laboristojn, ĉar la laboristoj estas ĉiom. Kaj estas dece, ke ni konstruu tiun indan Katalunion de la laboristoj, ĉar, kiel mi jam diris, ili estas la forto. Ni volas amon, fratecon k harmonion inter la laboristoj, ĉar ne devas esti laboristoj kun malamo inter si. Kaj ni esperas, ke la laboristoj scios reciproki tiun ĉi senton. Katalunio devas esti la unua nacio inter ĉiuj landoj el la mondo.

Tradukis SAT-ano 12030 el Gerono.



La kataluna problemo.

Macia, okaze de sia antaŭnelonga vizito en Madrido, ne volis havi rendevuon kun Maŭra nek kun Largo Kabalero, pensante, ke tio produktus tro malbonan impreson en Katalunio. Tio elmontras la grandiĝantan nepopularon de l'malbonsigna Maŭra k de l'ekssekretario de la Ĝenerala Unuiĝo de l'Laboristoj.

La kataluna naciismo, se oni atentas pri tio, fariĝos serioza danĝero por la disvolviĝo de l'laborista movado en Katalunio. Efektive, se la figuro de Macia estas fakte simpatia al la kataluna popolo (tio estas nekontestebla afero), la politika katalunismo ne havas realajn radikojn en la laborista klaso; ĝi naskiĝis ĉe la etburĝaro, ĉe la ŝtatoficistoj, k ĉi tiu parto de la kataluna loĝantaro vidas malfavore la kreskantan forton de l'Konfederacio Nacia de Laboro (la anarkiema sindikat-unuiĝo – *Red.*).

Ĉe la laboristoj, kontraŭe, oni komencas kompreni, ke la katalunismo povas, politike k socie, alporti nenian realan pliboniĝon. La trompmirinda programo pri kataluna aŭtonomio resumiĝas al kelkaj prerogativoj de administra ordo k la bona popolo, kiu voĉdonis kun entuziasmo la faman Regularon, komprenas nuntempe, ke ĝi estas trompegita unu fojon plian, k ke ĝia materia situacio, tute ne pliboniĝante, pligraviĝas de tago al tago!

Macia apartenas al unu klaso, la burĝaro, kontraŭ kiu, malgraŭ sia tuta „idealismo“, sia tuta „boneco“ li ne povas decide kontraŭstari. Kaj lia tuta simpatio por la Konfederacio Nacia de Laboro ne povas transiri la punkton: provi akordigi la radikale kontraŭajn interesojn de la posedanta klaso k de la laborista klaso.

La kataluna burĝaro lasas lin agadi, ĝis nun, ĉar Macia estas popola simbolo, malantaŭ kiu ĝi kaŝas siajn verajn intencojn; sed la tagon, en kiu ĝi estos plifirmiginta sian pozicion (se la laboristoj lasas al ĝi fari tion), ĝi forbalaos la tutan „idealismon“ de Macia k forĵetos la maskon. *Em. Mo.*

Publika alvoko el Usono al la SAT-ANARO.

Karaj Gek-doj! Reveninte Nov-Jorkon mi konsterniĝis pri la amaso da murdoj, kiuj okazas en ĉiuj urboj pro bataloj inter banditoj k policistoj. Nov-Jorko akiris „rekordon“. Eĉ stratbuboj ne estas sekuraj – da ili dum unu tago oni mortpafis kvar; sed skribi pri tio ĉi estas pli tasko de sensacia gazetaro, kvankam ankaŭ el tiuj okazoj multo estus lernebla. Tamen alio pli grava minacas okazi, nome

ekzekuto sur elektra seĝo al 36 ministoj!

Tiom da personoj oni akuzis en la ŝtato Kentuki, Harlana regiono, esti mortigintaj kvar policistojn. Aliajn oni akuzas pro „krima sindikatismo“. La nombro da akuzitoj kreskas ĉiutage.

La regiono aspektas kvazaŭ militkampo, teritorio, kiun invadis malamika armeo. Pri tio atestas eĉ la (burĝa) „Usona Asocio por civila libero“ (A.C.L.U.). Ĝi apelaciis al la ŝtatestro ĉesigi „la staton de milita sieĝo“. Ĝi akuzas la regionan oficistaron pri perfortuzo por rompi la strikon de la karbministoj, ĉiutaga forpreno de leĝaj rajtoj, penetro en la domojn sen komisio, arestoj evidente pro pretekstoj, ktp. Signifas bone ilustri la teroron, se mi informas vin, ke eĉ pastro troviĝas sub akuzo pro krima sindikatismo k en malliberejo. Inter la akuzitoj tenas lokon ankaŭ 5 negroj, el kiuj unu precipe heroe eltenis kruelan traktadon. Malgraŭ ĉiaj torturoj, li ne fariĝis falsĵuranto, kia oni deziris lin fari.

Sufiĉu la malmulto dirita. La burĝdevena protesto elokvente parolas. Eĉ tre vigla imago ankoraŭ estos fremda al la vera tiea terorstato. Ne kredu, ke tio ĉi estas falsa alarmo. Estu avertitaj k avertu ĉiujn laborsklavojn!

La ministoj petis la Ĝeneralan Defend-Komitaton de la Industriaj Laboristoj de la Mondo (I.W.W.) transpreni la defendadon al la akuzitoj. La sama komitato promesis doni k *donas* leĝan k ĉiun alian eblan helpon al la laboristoj sub la ungegoj de karbmastrara juĝisto. La helpon ricevas ĉiuj sen rigardo pri aparteno al partio aŭ sindikato. La ministoj apartenas al diversaj laboristaj organizoj. Do, ili rajtas sin turni al ĉiuj tendencoj en la laborista movado.

Jam komenciĝis la proceso. La prokuroro sukcesis forlokigi la proceson el la minista regiono al grandposedula. Vi komprenas la artifikon, ĉu ne? La distanco nun plimultekostigas la defendon nemezureble. Multaj miloj da dolaroj estas bezonataj. La oferemo tie ĉi mem estas laŭdinde granda, sed la bezonoj de la Defend-Komitato estas eĉ ankoraŭ pli grandaj.

Jen, mi havis belegan vizion, kiam mi sendorme sur lito cerbumis pri helpo en tiu ĉi monstra atenco kontraŭ laboristoj. Mi alvokos per „S-ulo“ k per la Ge-SAT-anoj la laboristojn de la mondo! – La perantoj kunvenigos la SAT-rondojn. – La Ge-SAT-anoj diskonigos la unuajn sciigojn pri la minacanta ekzekutteroro. **La SAT-anoj instigos siajn organizojn laboristajn, politikajn k sindikatajn oficiale kolekt-**

N. LENIN:
Ŝtato kaj Revolucio
150 paĝoj, formato 12×18 centimetroj. Prezo 1 mk. g.
Administracio de SAT, Leipzig O.27, Colmstr.

igi monon por la defendo al tiu ĉi larĝega nombro da ekzekutotoj.

Mi vidis formike diskuri la SAT-anojn por esti la heroldoj pri subpremo al laboristoj-ministoj en la Harlana Regiono, Kentuki, Usono. Mi vidis ilin organizi larĝskale k *respondece* kolektadon. Kolektiĝis groŝo post groŝo da ĉia monspeco. Pluvis poŝtmandatoj al:

Herbert Mahler. Sekretary General, General Defense Committee. 555 West Lake St. *Chicago*, Ill. Usono.

Ĉu tio fariĝos realo? Ĉu la tutmonda solidaro estas tiom forta? Mi ne dubas! Vi helpos por haltigi la trafluigon de mortiga kurento. Vi ne permesos rosti sur elektra seĝo 36 laboristojn! Monon sendu rekte al la Defendkomitato. Informu min pri viaj faroj. Mi informos per „S-ulo" pri tiu ĉi granda atenco kontraŭ laboristoj. *1307, Nov-Jorko.*

POR NIA MEDITO.

Plenscie akcepti la batalon, kiam tio estas profita al la malamiko k ne al ni, tio estas krimo; k ili estas malŝatindaj revoluciuloj, tiuj, kiuj ne scipovas zigzage, kontrakte, kompromise procedi por eviti malavantaĝan batalon.

Lenin.

Iu avangardo sola ne povas venki. Tio estus ne nur stultaĵo, sed krimo, ekbataligi sian avangardon sola en decida batalo, kiam la klaso en sia tuto, kiam la amaso ne prenis pozicion por certa subteno aŭ almenaŭ por favora neŭtralo, kiu igas ĝin nekapabla subteni la kontraŭularon. *Lenin.*

(El „La Infaneca malsano de l'Komunismo").

Menciu nepre esperanton ĉe represigo de artikoloj esper.-devenaj!

MI VOLAS SCII . . .

Lastatempe la gazetoj pli ofte raportis pri la banditoj en la urbegoj de Usono, la t.n. „gangster"-oj. Kiel konate, tiuj uloj postulas de komercistoj k negocistoj impostojn, kiuj sumiĝas ĝis 20% de l'enspezoj. Kiu ne regule pagas tiun tributon, estas minacata, prirabata aŭ eĉ mortpafata. La „gangster"-oj ankaŭ atakas strikantajn laboristojn k entute estas aĉeteblaj. Aliaj banditoj kontrabandas alkoholaĵojn aŭ ŝtelas k rabas en bankoj k juvelejoj; ili havas proprajn aŭtomobilojn kun maŝinpafiloj k tre malfacile estas kapteblaj. La polico ŝajnas esti senpova kontraŭ tiuj banditoj, ja altrangaj policoficistoj jam estis alianciĝintaj kun ili. Kvankam la „gangster"-oj estas konataj personoj, kiuj havas oficejojn kun lertaj advokatoj k libere vivas, oni ne povas subigi ilin. Dum la nuna krizo ili eĉ iĝis pli arogaj k plialtigis siajn postulojn. Ili „laboras" per la plej modernaj rimedoj. En vendejoj, kies posedantoj rifuzis doni depagojn, ili elverŝis malbonodoron (ĥemian preparaĵon), kiu neuzebligis ĉiujn varojn k la tutan meblaron. La policprezidantoj nur promesis kontraŭbatali tiun turmenton, sed ili ne sukcesis.

Mia demando tekstas: Kiel sintenus tiuj banditoj, se en Usono estus konstruota socialismo? Ili ja ne reprezentas socialan elementon k adaptiĝas al nenia ordo. Oni ne rediru, ke ĉiuj krimoj estas kaŭzitaj de la kapitalisma sistemo, ankaŭ tiuj de la nomitaj banditoj. Tio estus tro simpla klarigo. Kiel oni agus en Sovetio kontraŭ tiaj banditoj, se ili tie ekzistus? Mi deziras, ke la respondontoj pritraktu la temon laŭ psikologia vidpunkto. *F. S.*

* *

GEKAMARADOJ! Aĉetu ĉiujn de vi bezonatajn esperanto-librojn, gramatikojn, vortarojn, legolibrojn ktp. NUR ĉe la ADMINISTREJO DE SAT, Kolmstrato 1, Leipzig O. 27.

La klasbatalo tra la mondo

La ĝenerala striko en Barcelono.

Por helpi al politikaj enkarcerigitoj, kiuj protestis per malsatostriko kontraŭ sia sorto, la loka Federacio Sindikatara (anarko-sindikatista) proklamis la ĝeneralan strikon la 3-an de septembro sen fiksita daŭro. La sindikata ĵurnalo „Laborista Solidaro" tiam estis konfiskata en la laborejoj mem, sed kelkaj pakaĵoj evitis tiun sorton k povis esti distribuataj en la urbo. Aliparte flugfolioj konigis la strikordonon, kiu krome buŝe estis transdonata de la delegitoj el fabrikoj k konstru-laborejoj. La movado ekfunkciis mirinde. Neniu aŭtobuso, neniu tramo, neniu luaŭtomobilo en la stratoj. Fabrikoj k laborejoj estis forlasitaj. La grandaj magazenoj fermis siajn montrofenestrojn; la komercon tenis nur la etbutikistoj.

La unuaj kunpuŝiĝoj kun la polico k pafmortigoj okazis, kiam la policanoj ŝirmis strikrompantojn. La samo ripetiĝis kelkajn horojn pli malfrue, kiam la strikantoj volis respektigi la strikordonon. Policaŭtomobiloj kun pafpreta trupo trakuregis la stratojn. La lab.amasoj estis en la stratoj; ili estis dispelataj, sed ĉiam rekolektiĝis. En la nokto mankis plene la gaso; la elektro same en multaj stratoj. Nur por kelkaj ĉefstratoj la estraro sukcesis certigi la lumigon.

La duan tagon la situacio restis neŝanĝita. Sentiĝis malbonodoro de l'neforigitaj strataj balaaĵoj sub la suno. Nur unu oficiala gazeto aperis. De laborista flanko bedaŭrinde nenio estis publikigata pri la paso de l'movado. En la sindikatejoj regis granda viglo. Tagmeze la konstruo de l'konstrulaborista sindikato estis sieĝata de l'polico. Ekokazis pafado. Fine kun helpo de soldataro la policanoj sukcesis kapitulacigi la sieĝitojn post preskaŭ 4-hora batalo, k ĉi tiuj estis malliberigataj sur militŝipo.

En la fino de tiu tago la loka Federacio opiniis la celon de l'striko atingita k decidis post longa diskutado rekomencon de l'laboro por la *sekvanta tago*. Tiumomente la Federacio kredeble ankoraŭ ne sciis pri la nombro da mortigitoj k vunditoj, k certe ne povis antaŭvidi la buĉon al 5 arestitoj, kiuj perdis la vivon ĉe la policprefektejo pordo, sub preteksto de forkurprovo.

La 5-an de sept. preskaŭ ĝenerale la laboro estis rekomencita k la striko tiel finiĝis. *Sindikatisto.*

La mizeriĝo de l'ministaro en Germanio.

Dum la lasta jardeko la nombro de l'germanaj ministoj malplialtiĝis je preskaŭ 700 000. El 1 200 000, kiuj ekzistis en 1921, restis hodiaŭ nur proksimume 500 000. En la Rur (Ruhr)-baseno el 240 000 ministoj 85 000 estas senlaboraj. La deputito Huzeman (Husemann), kiu konigis tiujn nombrojn ĉe minista kunveno en Boĥum, aldonis, ke la meĥanikigita produktado reprezentis, en la jaro 1930, 83,8% el la tuta minejа produktado. Li opinias, ke la sola rimedo por kontraŭbatali tiun situacion, estas sistema reduktado de l'labordaŭro.

La 40-hora laborsemajno.

En la grandaj industriaj landoj, kiel Anglio k Germanio, oni serioze okupas sin en laboristaj rondoj pri la problemo de l'40-hora laborsemajno. La Kongreso de l'Libera Sindikataro Germania, kiu okazis en Frankfurto, ekzamenis tiun demandon k konkludis al la neceso de tiu paŝo. Unu delegito konstatis, ke, se tiu ĉi instalo tuj realiĝus, ĝi permesus al 800 000 senlaboruloj tujan okupiĝon. Komprenable per tio stariĝas kiel plej malfacile solvebla problemo la *salajra* demando, ĉar ne multaj entreprenistoj certe konsentus pri konservo de l'nunaj salajroj ĉe malpliigo de l'labortempo.

La Kongreso de l'Britia Sindikatara Unuiĝo siaflanke voĉdonis rezolucion, en kiu ĝi insistas, rilate la labortempon, ke la laborsemajno estu limigata al maksimumo de 40 horoj. Ĉi tiu kongreso akceptis ankaŭ rezolucion, kiu kontraŭbatalas la proponojn pri redukto de l'subvencio al senlaboruloj k pri pli forta partopreno en la pago de l'laborantoj al tiu subvencio.

P. P.

DISKUTEJO:

Ĉu seksa interrilato kun antisemitoj k semitoj?

Kun scivolo mi rigardis al negro, kiun mi dum mia vivdaŭro la unuan fojon en realo ekvidis. Miaj okuloj sekrete sekvis liajn movojn, tro volonte mi estus parolinta kun li, sed al mi mankis la necesa kuraĝo por paŝi antaŭ lin k prezenti min al li kiel homo k frato.

Tiu unua renkonto postlasis al mi bonan simpation al negroj. Jam pasis multe da tempo k mi havis okazojn renkonti negrojn, sed neniam mi cerbumis pri ili, kvankam mi ofte legis pri rigoraj punoj, eĉ linĉoj al indiĝenoj, se ili nur, laŭ onidiro de blankulino, estis sekse perfortintaj ŝin. Okazis foje ie fervojista renkontiĝo esperantista: ni promenis sur strato, jen ni renkontis negron. Ni esperantistoj tuj simpatie parolis pri li, ni eĉ alparolis lin, sed li komprenigis al ni, ke li scipovas la rusan lingvon. Inter ni ĉeestis fraŭlino, kiu ege koleris pri la negro, kvankam ĉi tiu tute ne konsideris ŝin; ŝiaj vortoj k mieno estis malbonaj. Mi restis silenta k pensis mian parton.

Denove pasis tempo, mi preskaŭ tute forgesis pri la okazintaĵoj, ĝis antaŭ kelkaj tagoj diskuto pri la rasa problemo k seksaj interrilatoj kun blanka, negra, hinda, juda ktp rasoj memorigis miajn pasintajn pensojn k instigis min diskut-proponi tiun temon al „S-ulo“ k la SAT-anaro. Kiel scienculoj diverse esprimas siajn opiniojn por k kontraŭ seksa ras-interrilato, tiel verŝajne la SAT-anara opinio estas diversa. Ekz. miaj kunlaborantoj multe klopodis por pruvi al mi teorie la malutilon pri tia seksa interrilato. Kelkaj eĉ opiniis, ke blankhaŭtulo ja tro baldaŭ devus morti, se li edziĝus kun ĉinino, hindino aŭ eble semitino, ĉar ŝi havas tute alian sangon ol nesemito ktp. Pro tiaj argumentoj blankulo neniam devus edziĝi kun alirasulino. Plie oni nomis al mi scienculon, kiu vivis inter genegroj, enamiĝis al virino el negra gento k gravedigis ŝin. La negra estraro decidis, ke kiam la embrio estos akuŝita, oni tuj mortigu ĝin. Tion sciiĝinte la scienculo petis, ke oni al li donacu vivanta la infanon; la negra estro konsentis. La scienculo ricevis la infanon vivanta. Li transdonis ĝin al edukisto, kiu instruis ĝin ĝis lia plenaĝo. Maturiĝinte li havis ĉiujn malbonajn ecojn kiel sagacajn malicojn, ĉar la plej malbonon la homo pli facile heredas ol la bonon laŭ la opinio de miaj diskutintoj. Iam li faris tro grandan krimegon k oni devis lin malliberigi por vivdaŭro. Nature miaj kunlaborantoj ne esceptis la judojn; nur ilin mem oni devas escepti kompreneble — ili estas katolikaj laboristoj naciemaj!

Mi deziras respondi al tio jenon: Ankaŭ inter geblankuloj troviĝas homoj, kiuj dum seksaj ĝuoj estas sufiĉe varmsangaj, voluptemaj, precipe post ĝuo de sufiĉe da alkoholo, nikotino, abunda manĝado de A-vitaminoj ktp. Tiam ili tro ofte malfidelas ĵurojn, kiujn ili faris dum eklezia geedziĝo, vizitas publikulinojn aŭ seksrilatas kun fraŭlinoj. En tia dilemo tro ofte okazas seksmalsaniĝo. Do la modernaj medicino k malsanulejo devas resanigi tiajn malfidelulojn. Triona elcento ankaŭ inter blankhaŭtuloj estas seksmalsana, sen ke la semitoj infektis nian tro belan haŭtkoloron. Mi opinias, ke semito ankaŭ estas homo kiel ni, li parolas lingvon, legas, regas teknikon, arton, sciencon ktp, do li faras la samon kiel ni; tial li ankaŭ estas inda envicigi en niaj aroj, k ĉiuj aliaj argumentoj estas eraraj. Rilate edukadon, oni nepre devus koni la edukiston, liajn ecojn k la metodojn, laŭ kiuj li edukis infanon, — do la supra eksperimento pruvas nenion. Mi lernis en psikologio: la homo ne naskiĝas kiel fripono, sed li povas tia fariĝi en la socio. Mia patro multe drinkegis k fumis; mi kleriĝinte ĉesis trinki alkoholon k fumi nikotinon: do mi ne heredis la plej malbonajn ecojn. Tial mi opinias tute nature k home, se la sorto kunigas semiton kun nesemito. *Ruĝulo 7658.*

KULTUR-BOLŜEVISMO!

J. Burger (601).

Laŭ la marŝritma germ. melodio:
Der Papst lebt herrlich in der Welt.

1.

Nun ĉie aŭdas, legas ni
pri „Bolŝevismo“ en Rusi',
ke estas tre danĝera ĝi
por monda civilizaci'.

2.

Konstatas multaj kun plezur',
ke alta estas la kultur'
de la germana brav-popol';
por kelkaj estas ĝi idol'.

3.

Sed vidu ĉion kun kritik':
tuj trovas vi, ke en praktik'
plej multo estas ŝajn-kultur'
tre ofte jam karikatur'!

4.

Polica hundo ĉe german'
ricevas pli ol la infan'
de senlabora karbminist':
ĉi ĉio je la nom' de Krist'.

5.

Mizeras viro de l'labor',
sed alta sum' por direktor';
por parazitoj grandpensi',
— aprobas ĉion eklezi'.

6.

Sed penas rusa proletar'
nun — post revolucia far'
per Kvinjarplan', literatur'
por homarinda nov-kultur'!

Kontraŭ la dogmojn

En la n-o 359, en traduko el „Sciencaj bazoj por histori-filozofio“, la aŭtoro, responde al sia demando, ĉu la racio povus influi sur la homojn sufiĉe instruitajn por analizi sian kredon, diras, „ke eminentaj scienculoj akceptas ĉiam kiel nediskuteblajn verojn religiajn legendojn...“ Almenaŭ ne ĉiuj, ĉar mi posedas libron de sufiĉe eminenta angla sciencisto, J. B. S. Holden (Haldane), en kiu li sentime kontraŭas religion. Laŭ tabelo kompilita de prof. J. H. Leuba, psikologo de Brin Mavr kolegio, kredo je dio ekzistas ĉe 50% da fizik-sciencistoj, 35% da biologoj, 25% da sociologoj; kredo je eterna vivo, ĉe 35% da fizik-sciencistoj, 18% da biologoj, 20% da sociologoj. Ĉi tiu tabelo inkluzivas ĉiun gradon de eminento inter la traktitaj kategorioj; oni povas supozi, ke la proporcio de ne-kredo ĉe la plej eminentaj ne malsuperas tiun ĉe la malplej eminentaj.

Ankaŭ la aŭtoro asertas, ke ĉe protestantismo, la koncepto, ke Dio lasis perei sian filon por elaĉeti la pekojn de siaj kreaĵoj, estas komplete malakceptata, ke „Kristo perdis sian dian originon“. Tamen en la angla protestanta eklezio oni instruas pri la elaĉeto k la dieco de Kristo.

Li ankaŭ identigas la komunismon kun religio. Kial? Ĝi estas bazita sur faktoj videblaj por ĉiu; ĝi ne estas pli religia ol estas bona mastrumado de patrino, kiu atentas, ke estu abundo sen malŝparo k justo inter la diversaj infanoj. La komunismo nur celas pogrande tiajn rezultojn. Se elstariĝis homoj por teoriumi k organize alceli la komunismon, ili estis surteraj k ne imagitaj ĉielaj dioj. Plue, se kompartianoj akceptas post ekzameno la eltrovojn k direktliniojn de la gvidantoj, kial oni parolu pri „kredo“ aŭ „dogmo“ pli ol ĉe la patrino citita?

Oni ankaŭ legas: „Se la komunistoj estus destinitaj suferi sur iu ajn punkto de l'terglobo la turmentegojn, al kiuj Nerono kondamnis la kristanojn...“ Ŝajnas, ke la aŭtoro estas tute nescia pri sia temo, aŭ kontraŭkomuniste laŭvole blinda. Almenaŭ ni danku pro lia „boneco“, ke li ne volas la persekutadon al la komunistoj, ĉar ĝi nur povas helpi al la komunismo!... *E. K. L.*

Ĉu vi ne ankaŭ volas iom helpi en la resanigo de la SAT-financoj? — Do, pagu jam nun vian kotizon por 1932!



Redakcia adreso: A. SCHWARZ, Lerchenstraße 14
NECKARSULM (Germanio).

Junulara Kunsido ĉe la XI-a SAT-Kongreso

(4-a de aŭgusto 1931).

Ĉeestis 31 Gek-doj el 8 landoj. Prezidis la kunvenon K-do *Moravec*.

La prezidanto post malfermo proponis, ke oni laŭtlegu la raportojn. La proponon akceptis la kunvenintoj, k ili estis laŭtlegataj. La raporto de K-do *Ŝvarc* temis pri Junulara Paĝo k pri la Sekcio. Ĝi ankaŭ enhavis kelkajn proponojn de la redaktoro: ke 1) la kunsidantoj elektu komitaton el kapablaj Gek-doj, ne nur bonvolaj, sed ankaŭ kleraj, kiuj prilaboru la edukajn, klerigajn disertaciojn por J. P.; 2) la Sekcio abonu aŭ interŝanĝu aliajn esp. junularajn ĵurnalojn, por ke oni ne estu tute dependa de hazarda kunlaboro; 3) ni devas enketi pri adresoj de junular-organizoj, iliaj presorganoj ktp., por ke ni povu servi ilin mondskale. La tasko de la landaj korespondantoj estas sciigi adresojn al la Sekcio. Ni devas scii, kie k kiam okazos jun.kongreso ktp.; 4) ni pritraktu, ĉu eblas krei specialan bultenon. — Tio ne estis efektivigebla en la lasta jaro. La Sekcio nur ricevas monsumeton de la Direkcio, sed ne havis propran kotizon. Ĉu ni do starigu malgrandan kotizon?

La kunsidantaro poste deklaris sin kontraŭ propra kotizo.

Ĉar K-do Ŝvarc spertis dum la pasinta jaro mankon de iniciatemo k kunlaboremo ĉe la SAT-junularo, li sugestas, ke eble en nacia kadro oni povas krei esp. junular-movadon. En Anglio oni jam ion tian iniciatis. En Germanio oni eldonas monatan infanorganon. Kelkaj K-doj en la kunsido ne tre ŝatis la enhavon de ĉi tiu gazeto. En infana organo oni ne uzu aŭ almenaŭ ne trouzu vortojn kiel „imperiismo“, „ekspluatado“ ktp., kiujn infanoj ne komprenas. Oni klarigu la aferojn tiel, ke ili komprenu ilin.

La konkludo de K-do Ŝvarc do estas, ke ni devas organizi la infanmovadon unue en nacia kadro. Laŭ K-do Ŝvarc nia praktika laboro devas esti intima kunligiĝo kun la junul-amasoj. Ni devas interligi ĉiun al ni atingeblan junulrondon kun tia en eksterlando, al ĝi helpante per tradukservo, perado, lingva instruo. Ni devas proponi helpon al la ekzistantaj infanorganizoj, organizi kolektivan koresp. kun eksterl. infanoj. — Ankaŭ estis raporto de la sekretariino de Brita lab. esp. jun., K-dino E. Wilson, kiu proponas, ke okaze de la venonta kongreso okazu junulara tendaro. Poste ni aŭdis raporton pri „la tasko de la junularo en la klasbatalo mondskala“ de K-do Vetig.

La kunsidantoj tamen opiniis, ke ankoraŭ ne venis la tempo por povi aranĝi la laboron, kiun proponis K-do Ŝvarc. Ili lin reelektis kiel J. P.-redaktoron. Laŭ propono de unu K-dino ni fine decidis aranĝi rond-korespondadon. Ni elektis centran komitaton konsistantan el jenaj Gek-doj: K-do Francisko Moravec, *Gross-Ottersleben* ĉe Magdeburg, Germ.; Bern. Weber, 15 Minson Road, *London E. 9;* K-dino A. Duif, v. Spilbergenstr. 22 huis, *Amsterdam-W;* K-do Francis Paquier, 7, rue Lauzin, *Paris XIX*. Tiu ĉi komitato kolektos la adresojn de tiuj, kiuj deziras partopreni la rond-korespondadon. Ili kombinos po 5 Gek-doj en 1 rondeto. La unua el tiuj 5 skribas leteron pri iu temo k sendas ĝin al la dua. La dua aldonas sian opinion pri la sama temo k sendas ambaŭ let. al la tria, ktp. Kiam ĝi estos tute rondirinta, la unua skribinto elprenas sian leteron k enmetas novan ktp. Ĉi tio estas la sola praktika rezulto de ĉi tiu kunsido.

La protokolinto: W. P. Roelofs.

Konsidero pri la fakkunveno en Amsterdamo

K-do W. P. Roelofs per sia lasta frazo karakterizis la rezulton de l'Junulara fakkunsido. Tiu rezulto estas ja la plej klara pruvo pri senhelpeco. Kiel disventiĝis la eduka, kleriga laboro farita en SAT?! La ĉeestanta listo dokumentas, ke ne partoprenis novuloj nur, sed Gek-doj estantaj *dum jaroj* en SAT! — Kion faris la fakkunveno k kion fari ĝi estus devinta?

La plej elementa postulo estas la prezento de tagordo, kiu en tia okazo devas enteni: a) prezenton de raportoj, ties pridiskuton k kritikadon, b) analizon de mondskala situacio k laŭ tio perspektivojn por nia laboro estonta, c) komisiadon al plenumaj funkciuloj. Fakto konata estas, ke la estra posteno de la Jun.Sekcio estas vaka depost preskaŭ unu jaro. El la raporto neniel montriĝas, ke la kunsido elektis estron. La fakkunsido faris bankrotdeklaron per jena konstato: „La kunsidantoj tamen opiniis, ke ankoraŭ ne venis la tempo por povi aranĝi la laboron[1], kiun proponis K-do Ŝvarc.“ Vere, oni devas esti absoluta analfabeto rilate al historio k kompreno pri klasbatalo konstatante, ke en epoko, kiun markas la organizado de larĝaj infan- k junul-movadoj, la *tempo* ne jam venis por praktika peresp-a laboro! 2) Laŭ diroj de E. Lanti la tasko de SAT estas meti esp-on en la servon de la tutmonda proletaro. Kaj kion faris la Sekcia kunveno? Ĝi evitis ĉian seriozan laboron! Ĝi propone aranĝas ĉenletersendadon k al tiu farso elektas kvarmembran komitaton! La rezulto estas skandala, estas komedia ridindaĵo. Kiaj kaŭzoj postulas ĝin? La kunvenintoj sin trovis sur individua bazo, laŭ la strukturo de SAT. Kiun reprezentis la 31? Por kiuj validas ilia decido?

La fakkunsido nenion diris pri laboro estonta, nenion pri la enhavo de J.P., ĝi ne elektis komitaton por klerigaj disertacioj, ĝi ne difinis funkciulojn! Ĉu tio signifas, ke la Sekcio falu en letargion? Neniam! Se tia estus la ĝenerala opinio, vere tiam la Sekcio estus likvidenda. Jam iu riskas primoki J.P.-on „rifuĝejo, kiun afable starigis SAT“ (*tiel*)! Mi faris proponojn likvidi la malaktivecon. La fakkunsido, konsistinda el hazarde kunvenintaj, sen multa scio pri sekciaj laboro k taskoj, ilin malakceptis. Miaj proponoj celis doni laboran bazon al la Jun.Sekcio, kiu ĝin, malgraŭ kelkjara ekzisto, malhavas ankoraŭ. Se la J.S. ne volas plenumi specialajn por ĝi taskojn, kial do ĝi ekzistu? Kial do kelkaj laboremuloj malŝparu siajn fortojn k energion en ŝajnformaĵo kiel J.S.? La Amsterd. fakkunsido ne kapablis inde taksi la seriozon de laboro. Tial mi vokas al ĉiu kunlaborema K-d(in)o: kritike traktu ĉi subajn proponojn pri konkretaj faroj, kompletigu ilin laŭpove, k se al vi ŝajnas, ke la J.P. devas k povas labori k vi emas partopreni, do ekinterrilatu tuj kun ni: „Konstatante, ke en fazo de plej akriĝinta klasbatalo, kultura organizo nur povas havi karakteron de pionira taĉmento, ĉar fakta kulturo nur trovos evolu-kondiĉojn en libera lab.kamparana lando, ni konsideras niajn taskojn jene: Al junular-organizoj ekzistantaj revoluciaj ni proponas nian forton k emon kunhelpi al ili per nia speciala fako „tradukado k perado“, celante ĉiel subteni la plirapidigon de revol. renversa procezo. Nia praktika

[1] Mi ne proponis laboron *entutan*, sed miaj proponoj estis diversaj. Ĉu do por neniu el ili jam venis la tempo? 2) En ĉiuj landoj disvolviĝas organizoj de Ruĝaj Falkoj, Prol.skoltoj, Juna gvardio, Pioniroj k. s.; ĉi lastaj havas 4-milionan anaron en Sovetio!

La triumfo de l'alkoholo.

Mi nomas min alkoholo! Mia reĝolando estas la tuta mondo. Kiu egaliĝus min? Kiu estas tiel forta k potenca kiel mi? Mi estas reĝo super la reĝoj, potenculo super la potenculoj. Mia fortego estas neelĉerpebla, mia aŭtoritato senlima. Mi estas venkinta k eksterminta tutajn naciojn, mi entute detruis centfoje pli ol milito, malsato k brulegoj. Mi havas ja tutajn legiojn da adeptoj k adorantoj.

Mi nomas min – alkoholo! Al junulo mi elŝiras la sanon, al virgulino la honoron, al viro la forton, k al virino la honton. Mi faras el homo ŝteliston, falsĵuriston, perfidulon k eĉ mortiganton. Miaj adorantoj k subuloj turmentadas senkompate siajn edzinojn k infanojn, ili suprenigadas manojn kontraŭ siaj patroj k patrinoj. Ekzistas neniaj ordonoj diaj k leĝoj homaj, kiujn ili ĉiutage petole ne transpaŝus k ne surpaŝus.

Mi loĝatigas ne nur malliberejojn, sed ankaŭ frenezulejojn, malsanulejojn k azilojn.

Kio estas ĉiuj krueluloj kompare al mi?

Mi estas pli terurega ol barbara Nerono, pli potenca ol milito k pesto. Mi estas kiel idolo Moloĥo, al kiu oni oferas volonte honoron k havaĵon, edzinon k infanojn, kapon k animon. En mia regno la suno estas neniam subironta.

Mia potenco estas nemezurebla k mia regado severa k tirana. Kiam mi estis eltrovita, oni imagis, ke aperis la fluidaĵo de la vivo, k jen mi estas nur trinkaĵo de la morto k de grandega malfeliĉo por ĉiuj popoloj. Mi promesas plifortigi la animon k mi senkonsciigas k depremas ĝin: mi promesas kontenton k ĝojon – k anstataŭ tio mi kaŭzas interbatiĝojn k perfortojn.

Dum ĥoler-epidemio oni elstarigis min kiel certigan profilaktaĵon[1]. Sed eĉ tiam mi trompis la esperon k la ĥolero ensorbis dekfoje pli da drinkuloj ol sobruloj. Mi vestas min en ĉarma vestaĵo; mi vojaĝas tra la mondo sub la bruaj nomoj k mi scias tikli k ĉarmi sentamon. Ekvidu nur diverskolorajn afiŝojn surgluitajn sur la urbmuroj k stratoj. Ekrigardu anoncojn en ĉiutagaj gazetoj k ilustritaj ĵurnaloj, kiuj publikigas mian gloron. Sed ĉio ĉi estas nur mensogo k perfido. Ekrimarku multekostan fluaĵon en pokaloj, kiel ĝi brilas k ŝaŭmas – sed ĉio ĉi estas nur mensogo k perfido!

Rigardu, jen en la foso kuŝas homo. Lia familio atendas lin jam delonge. Li promesis al ĝi iri hodiaŭ post la laboro rekte hejmen, ĉar unu el liaj infanoj estas malsana k luktas kontraŭ la morto. Sed mi lin ne lasis k mi paroletis nur en lian orelon: iru kun mi por iom amuziĝi. Trinku nur unu glaseton. Vi havas ja dome ĉagrenon – k kiom li obeis min! Li jam apartenis al mi. Kiam li vekiĝis k hejmrevenis, lia infano estis jam mortinta.

Ĉu vi vidas tie ĝendarmon k kondukatan tra la stratoj krimulon? Li mortigis sian kamaradon ĝuste ĉe botelo da brando, ĉar ili ambaŭ intermalpaciĝis ĉe kartludo, ĉi tio estas ankaŭ mia afero.

Rigardu ĉi tiun infaneton kuŝantan sur mizera tabullito k suferantan je konvulsio – ĝia vivo estas venenita jam de l'unuaj tagoj, ĉar ĝiaj gepatroj estas miaj subuloj k sklavoj. Ĉi tio estas ankaŭ mia afero.

Observu tiujn ŝanceliĝemajn personojn kun besta vizaĝo k salivaj lipoj, kun okuloj sangumitaj – ĉiuj ili estas miaj sklavoj drinkuloj. En malmola servo ili estas ĉe mi, ĝis sango mi vipas k turmentas ilin.

Ilia ekscitita sango kuris kiel fajro tra la vejnoj. Sed ili devas ĉiam trinki k ekbruligi ĉi tiun internan fajron, inferan fajron. Mi vestas ilin en ĉifonaĵojn, iliajn infanojn mi suferigas per malsato, mi pagas al ili per eterna morto, sed ili ne ĉesas trinki.

Kaj kiu kuraĝus difekti mian potencon, kiu estus kapabla liberigi miajn sklavojn? Ĉu scienco k klerigo? Montru al homoj en kiel eble plej nigraj koloroj la danĝerojn minacantajn al ĉiuj, kiuj uzadas alkoholon. Konfirmu viajn konkludojn per klaraj ciferoj, indiku, ke laŭ sperto k statistiko por ĉiu cento da memmortigoj k por ĉiu cento da frenezuloj venas po 70 drinkuloj, ke el cento da diversaj krimoj 75 sub influo de alkoholaj glasetoj efektiviĝas, ke multe pli frue ol fizikan vivon mi ruinigas eksenton de devo, honto k respondeco. Kia rezulto de ĉi tio? Jen en plej bona okazo kelkaj malfidelaj drinkuloj pripensos la aferon k forĵetos la glaseton por semajno, monato, jaro – pli malofte por ĉiam. Aliaj restas fidelaj al mi.

Mi kondukas miajn sklavojn al pereo k kondamno. Demandu ilin, kiomfoje ili intencis komenci la novan vivon, kiam ili estis vekiĝintaj matene post fordrinkita nokto kun malplena kapo, kun rigidaj vundetitaj pezaj membroj, kun disŝiritaj k malpurigitaj vestoj k kun senmonigita poŝo: Kaj kiam ili denove perlaboris la monon, ili ree apartenis al mi. Mi helpas al ili forgesi la bonajn intencojn. Oni vokas kontraŭ mi policistaron k ŝtatan leĝdonon. Kvazaŭ mi timus tiajn decidojn ... Tuŝu min nur iu ajn – k senprokraste ekstaras por mia defendo miloj da batalantoj, en unua vico grandaj taĉmentoj da brand- k bierfaristoj, drinkejestroj, restoraciistoj k drink-industriistoj, kiuj per sia veplendo plenigadas la tutan mondon.

Laŭvere – neniu en la mondo posedas tiom da amikoj sindonaj kiel mi. Tial mia potenco estas grandega, mia regado nevenkebla. Mi ruinigis jam milionojn – k mi ruinigos ankoraŭ pli multe.

Mi estas do ĉiopova, la plej minaca malamiko de la vivo, la plej monstra k terurega tirano.

Mi nomas min – alkoholo!

Prof. Sygnarski (Bydgoszcz).
Komunikis K-do 7998.

[1] Antaŭgardilo. – *Red.*

... laboro konsistu el: Intima kunligiĝo kun la gejunul-amasoj; interligo de ĉiu al ni atingebla junularmovado kun tia en eksterl.; daŭra helpado per tradukservo, perado, lingva instruo. Penetrado en la infanaron. Organizado de kolektiva koresp. kun eksterl. infanoj. Lingva instruo, perado (laŭeble infaninterŝanĝo dumferia). Propono de helpo al ekzistantaj infanorganizoj; kie tiaj ne jam ekzistas, klopodi tiajn krei. Favorigi ĉiujn prol.junul- k infan-organ-ojn por esp-o; kreo k pliampleksigo de kadroj da peresp-aj junul-funkciuloj. Objektiva raportado pri laboro farita, cirkonstancoj ktp. Kompilo de adresoj el la jun.-movado tutmonda por prilaborado landskala. *A. Ŝvarc.*

POR NIA DISTRO

Jen kiel granda eldona firmo el Japanio anoncas la librojn, kiujn ĝi ekvendas:

„La legantoj trovos ĉe ni la sekvantajn avantaĝojn: 1) prezojn tiel favorajn kiel en la loterioj; 2) librojn tiel elegantajn kiel kantistino; 3) presaĵon tiel klaran kiel kristalo; 4) paperon tiel rezistan kiel elefanthaŭto; 5) klientojn traktatajn tiel ĝentile kiel ili estus en ŝipkompanioj konkurencaj; 6) komercaĵojn forsendatajn tiel rapide kiel pafilkuglo; 7) pakaĵojn pritraktitajn kun tiom da zorgo kiom tiu, kiun donadas amanta virino al sia edzo."

Korektoj.

Ĉar antaŭ ricevo de l'redakciaj korektoj la kompostaĵo por n-o 362 estis prenita en la maŝinon, troviĝas en ĝi pluraj korektendaj preseraroj. Precipe unu parto de la eldono de *La Lernanto*, nome tiu parto, kiu kun n-o 362 estas liverita al la abonantoj de „S-ulo", suferis pro tiu afero. En ĝi bonv. legi sur la 3-a paĝo, maldekstra kolono, 2 liniojn super la figuro, la tekston jene: „... la tri blankuloj k la tri negroj, kiuj estas same veturontaj trans riveron nur duope sur *malgranda barko, tiel ke neniam unu blankulo restu sola kun du negroj sur* la bordo de la rivero. (La *kursive* presitaj vortoj mankis en la kompostaĵo). Sub „Lingvaj Notoj" bonv. legi en la 8-a linio la frazon jene: „Neniam estis, *nek* nuntempe estas." Kelkajn liniojn pli sube devas esti „English" (anst. *Englisch*).

En n-o 362, p. 390, la unua piednoto estas malĝusta, tiusence, ke ne temas laŭ la ideo de Ŝa (Shaw) pri simila (do kvinjara plano) por Britio, sed pri la *nuna* plano, t. e. pli kompreneble dirite, la nuna sistemo reganta en Britio, kiu ja fakte ne havas planon, sed estas senplana k ĥaosa.

TRA ESPERANTIO

Tra la Esperanta Gazetaro

Nin trafis kelkaj ekstereŭropaj gazetoj. *La Suda Kruco*, aperanta en Aŭstralio, kvankam modest-aspekta, estas sufiĉe interesa k bonredaktata gazeteto. Sed ŝajnas, ke la redaktoro atribuas al la neŭtrala semajna gazeto „Heroldo“ iom tro da kvalitoj: li diras, ke tiu gazeto *cirkulas en sep kontinentoj!* Oni instruis al mi en la lernejo, ke ekzistas kvin kontinentoj, sed povas esti, ke en Aŭstralio oni kalkulas ankaŭ la nordpolusajn k sudpolusajn glaciaĵojn kiel apartajn kontinentojn. Fakte ekzistas tie iom da tero; sed mi forte dubas, ke en tiuj „kontinentoj“ iu esp. gazeto havas eĉ nur unu abonanton. – *Amerika Esperantisto*, aperanta en Usono, grandparte anglalingva, eldonis specialan n-on ekster la serio: „La Juna Amerikana Esperantisto“ kun multaj instigoj al la junularo: vere pionire oni klopodas en usonaj esp-istaj rondoj konkeri la plej junajn. Tiu lasta eldonaĵo ankoraŭ ne estas definitive certigita, sed ekzistas la intenco ĝin aperigi 1/4-jare. – Pri la viglaj aziaj gazetoj (en Japanio, Ĉinio) parolonte aliam, ni turnu nin al Eŭropo. Jen la *Iberia Esperantista Revuo*, eldonata dumonate en Barcelono: sur la titolpaĝo de ĝia dua n-o ni legas entuziasman saluton al la nova Respubliko, kiu „pace stariĝis k grandanime pardonis la kulpojn de unu el la plej fiaj monarkioj iam ekzistintaj“. Bedaŭrinde, kara redakcio, tia „grandanima pardonado“ ne ĉiam estas ĝustaloka k povas eĉ tre malutili al la afero, al kiu vi servas... *Holanda Esperantisto* raportis sufiĉe detale pri nia XI-a Kongreso, k ĝia raporto eĉ estis riĉe ilustrita; en alia n-o iu partopreninto skribas pri la Krakova (neŭtralula) kongreso jenajn notindajn konsiderojn: „Estas bedaŭrinda fakto, ke la nombro de ĉeestantoj en tiuj laborkunsidoj (nome ĉe la neŭtrala kongreso – *Red.*) estas nur tre malgranda. Kaj apenaŭ oni povas malpravigi la kongresanojn, kiuj preferas vagi en la urbo aŭ fari ekskurseton, ĉar verdire granda parto de tiuj laborkunsidoj estas sufiĉe seninteresa. Kaj mi antaŭvidas, ke tiuj kunsidoj senhomiĝos pli k pli, se la estraroj ne sukcesas trovi vere interesajn temojn por ili.“ Kia konfeso! Oni komparu kun tio niajn SAT-kongresojn, en kies laborkunsidoj la multnombraj ĉeestantoj disciplinite restas ĝis la fermo, eĉ se kunsido daŭras ĝis preskaŭ noktomezo! Sed kompreneble, al la SAT-anaro ne mankas temoj. Pri la vivo mem de nia organizo ja temas en niaj debatoj, k ĉiu sincera K-do arde batalas por ĝi en niaj kongresoj.

Jam ni trovis raporton pri nia Amsterdama Kongreso en kelkaj LEA-gazetoj. La unua gazeto, kiu fruntpaĝe raportis pri ĝi, estis la organo de l'Nederlanda LEA, „Laborista Esperantisto“, kies redaktoro mem loĝante en la kongresurbo, sukcesis rekorde pretigi k presigi sian raporton jam antaŭ ol la kongresintoj disiris! Ili tiel povis ricevi eĉ ekzempleron de tiu ĉi n-o en la kongresejo mem dum la lasta kongresa tago. – En la n-o 7 de la Bulteno de Brita LEA (*The Labour Esperanto Bulletin*), kiun redaktas K-do *Stej*, troviĝas objektiva raporto en angla lingvo; cetere la tuta Bulteno estas anglalingve redaktita k aperas ĉiumonate. En *La Socialisto* (sept.), la organo de l'Aŭstria LEA, la raportanto *g-K* opinias en la fino de sia raporteto, ke „ĉiu klarvida homo devas konstati, ke la esp-movado ne havas ian ekskluzivan pozicion socian, ke ĝi ne povas sukcesi tion, kio sukcesis ĝis nun al neniu branĉo de la lab.movado: koncentrigi ĉiujn tendencojn en konkorda kunlaboro.“ Do, vi, SAT-anoj en ALLE, kiuj vi akceptis la Statuton de SAT, k vi, ceteraj legantoj de „La Socialisto“, al kies klarvido sin turnas la raportanto, kion vi pensas pri tiu opinio? Mi ne dubas, ke tiu vere SAT-aneca spirito, kiu estas bazita sur toleremo k komprenemo rilate al la diverstendencaj opinioj, estas pli forta k pli potenca ol tiu – cetere ne la unuan fojon aŭdita – voĉo kontraŭ organiziĝo supertendenca en „La Socialisto“!

N. B.

Esperanto ĉe revoluciaj studentoj en Hispanio.

Al *Zamoro* areto da junuloj studantaj en la Madrida Universitato k ĝia Medicina Fakultato venis por somera ripozo; nun viglas inter ili la revoluciaj inklinoj, k ni revol.esp-istoj ne perdas la okazon por inokuli la esp-an ĝermon inter ili. Mi kiel esperantist-komunista studento jam kredigis al multaj, ke plena revolucio sen esp-o estas falsaĵo. Mi klarigis la kialojn k ili jam komprenis la bezonon de nia „sennacieca“ lingvo. Videbla pruvo estas, ke ĉi tiuj studentoj antaŭ nelonge komencis eldoni ĵurnalon k entuziasme konsentis, ke ĝi enhavu *esperantan fakon* sub la titolo „Vejno esperantista“. La redaktoro jam duone scipovas esp-on k preskaŭ ĉiuj internaj kunlaborantoj okupiĝas serioze pri ĝi (kvankam eksteren ili ankoraŭ ne kuraĝas pritrakti la aferon). Ambaŭ movadoj, la esp-a k la komunista, iras ĉi tie kune tra la samaj reloj. Ĉiulandaj K-doj, konigu esp-on inter la rev. studentaro.

A. Hernandez (Hispanio).

MEMORNOTO

Pri la SAT-Kongreso raportis:

Oberfränk. Volkszeitg., Hof, 1. 9.; *Le Peuple*, Bruselo, 19. 8.; *Schwäb. Tagwacht*, Stuttgart, 27. 8.; *Volksstimme*, Hagen, 22. 8.

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Münchener Post, 2. 9.; *Sächs. Arb. Ztg.*, Leipzig, 1. 9.; *Volksztg.*, Düsseld., 25. 8. (kun foto); *Signalen*, Stokh., 3. 9.; *Le Prolétaire*, Liége, 23. 5.; *L'Avenir Socialiste*, Lyon, 29. 8.; *Travail*, Lyon, 5. 9.; *L'Effort*, Lyon, 5. 9.; *L'Unité Ouvrière*, Paris, 1. 9.; *L'Eclaireur du Soir*, Nice, 30. 8. (pri „Vortoj“ de K-do Lanti); *Le Populaire*, Paris, 10. 9.

En flugfolio de l'Germana Senlaborula Asocio (Berlin), membro de l'Internacia Senlaborula Federacio, estas dirite, ke ĝia kongresa lingvo estas esperanto.

NIA POŜTO

17231. – Urĝajn anoncojn oni ĉiam sendu al la Red. en Parizo, la monon al la Adm. en Lajpcigo.

12295. – Ĉe ĉiuspecaj demandoj al la Administracio oni nepre almetu afrankon por la resp., aliel ni ne resp. *Adm.*

13607. – Ni uzos vian artik. tuj kiam eble. Ni ĉiam ĉi tie resp., se la aŭtoro petas tion, sed ni ne povas malŝpari lokon por sciigi pri la sorto de ĉiu materialo ricevata. Ni tiam bezonus ĉiusemajne unu kolonon. Pri la „fakpaĝoj“ la koncernaj redaktoroj respondecas mem.

17117. – Aperos via artik.

17030. – Ni volonte enmetus vian artik., sed estas en ĝi kelkaj esprimoj, kiujn ni ne komprenas; ekz., kion signifas „Kvarkonvecio“? *Red.*

KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. g. – Grandaj anoncoj kun kadro: po kv. cm. kostas 0,20 mk. g.

GERMANIO

Viglan koresp-adon garantias 5 K-doj pri ĉ. temoj, kĉl, kun perf. esp-istoj. Adr.: H. Ruddat, Witthausstr. 31, *Dortmund-Aplerbeck.*

3 socialistaj junuloj (17–19 j.), kĉl, pri ĉ. temoj. Adr.: Erwin Ebermann, Rauhentalstr. 30, *Meissen-Sa.*

K-do Herbert Domaschke, Karlsruher Str. 19, *Dresden A 40*, interŝ. PM, kĉl, en ĉ kvanto j. Resp. garantiata. Alia koresp-ado nedezir.

NEDERLANDO

Senlabora kukbakisto (fraŭlo. 24 j.), serĉas laboron en kukejo aŭ alian en Holando k eksterlando. Adr.: K-do H. A. Kroonder, Hoofdweg 311, *Amsterdam.*

SVEDIO

Nia novfondita klubo aranĝos letervesperon, la 22. 10. Gek-doj ĉl., sendu senprokraste L, PK, PI. Resp. gar. Adr.: R. E. Eriksson (16951), Nimrodsgat. 2/III., *Värtan.*

ENHAVO

paĝo
Pri la kvinjara plano 403–404
El Hispanio 404–405
Publika alvoko el Usono al la SAT-ANARO 405–406
Por nia medito 406
La klasbatalo tra la mondo . . 406
Mi volas scii 406
Diskutejo 407
Ĉu seksa interrilato kun antisemitoj k semitoj? . . . 407
Kultur-Bolseviŝmo 407
Junulara Paĝo 408
La triumfo de l'alkoholo . . . 409
Por nia distro 409
Tra Esperantio 410

Presejo: Oscar Wettig, Gelnhausen (Germanio)